

sub la suda kruco ★
junio 2017

ESPERANTO



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 25 [2] numero 127 junio 2017

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
Redaktistoj: David Ryan, Joanne Johns
Kontaktadreso | esk2@esperanto.org.au

AEA - ESK
G.P.O. Box 2122
Melbourne, Victoria 3001
Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto sub la Suda Krucio estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEa | www.esperanto.org.nz – exec@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk2@esperanto.org.au

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15-a de aŭgusto 2017

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj
en ĉi eldonajo respondecas la aŭtoroj.
Ili ne necese spegulas la opiniojn
aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2016 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 2207-0087.

SUR LA KOVRILO: Vilĉo Svingvostulo (*Rhipidura leucophrys*)

- 
- 5.** Esperantistaj alilandanoj en Aŭstralio
 - 7.** Divenu la urbon - Parto 1-a
 - 8.** Birdnomoj aŭstraliaj
 - 9.** Gavino kaj la verda giganto
 - 13.** Nokto en la aŭstralia boŝo: intensa soleco
 - 14.** Pioniroj de Esperanto en Kvinslando
 - 16.** Honore al Lidia Zamenhof
 - 18.** Gavino kaj la hida damo
 - 21.** Divenu la urbon - Parto 2-a
 - 24.** Poeziece Esperanto venkas (Parto 2)
 - 27.** Vivo en la Spirita Mondo

junio, du mil deksep

Ĉi tiu numero estas plena je kontribuoj de niaj legantoj. Multan dankon al ĉiuj! Bonvole daŭre kontribuu kaj, se eblas, sendu fotojn.

La artikolo de Charles Stevenson pri alilandaj esperantistoj en Aŭstralio pensigis min: antaŭ 100 jaroj tiuj homoj, kaj multaj aliaj ne menciitaj en la artikolo, vigle propagandis kaj varbis pri Esperanto kaj nun ni honoras ilin kaj dankas pro ilia kontribuo al nia lingvo kaj movado. Tamen, kion oni diros pri NI post 100 jaroj? Ĉu oni diros ke ni same aktivis en la fruaj jaroj de la 21-a jarcento por progresigi nian aferon? Do, pensu pri tio.

Ankaŭ, viraj legantoj, en la bela rakonto de Tom O'Grady pri Gavino

kaj la hida damo, vi finfine trovos respondon al la ĉiam malfacila demando: kion ĉiu virino plej deziras?

Tamen, *Esperanto sub la Suda Kruco* povas esti pli leginda. Sendu al ni viajn komentojn. Kion vi volas vidi en ĉi tiu via revuo? Ĉu pli da artikoloj pri la movado, vojaĝoj, bestoj? Ĉu pli da receptoj aŭ vortenigmoj?

Mi dankas al Marko Schmidt kiu sendis desegnaĵojn por ĉi tiu numero, kaj dankon al mia amiko, Joaquín el Meksikio, kiu sendis al mi la ĉi-suban bildon de la verda ŝafo. Eble ĉi tiu bildo povas esti nova simbolo por nia asocio en Nov-Zelando, ĉu ne?




Eble ĉi tiu bildo povas esti nova simbolo por nia asocio en Nov-Zelando, ĉu ne?

Esperantistaj alilandanoj en Aŭstralio

CHARLES STEVENSON (ADELAJDO)

Tre okupis min legi la *Suda Kruco* de la komenco de 1920 kaj ankaŭ aliajn ĵurnalojn pri Esperanto. Estis forta homamaso da elstaraj homoj kiuj subtenis Esperanton en la unuaj jardekoj de la 20-a jarcento. Ŝajnas al mi ke la oraj jaroj por Esperanto estis la 1920aj. Estis multaj kluboj: en Melburno, ekzemple, estis kluboj en Northcote, Carnegie, Sandringham, Mount Albert, Oakleigh, Armadale, Melburno mem, kaj Warburton. Estis membroj de ĉiuj okupoj; estis pacifistoj kaj militistoj, eklezianoj kaj ateistoj, viroj kaj virinoj. Signifaj estis la alilandanoj, pli multaj ol oni atendus en ia asocio. Fakte, laŭ mi, alilandanoj estas la sola signifa kategorio trovebla inter esperantistoj en Aŭstralio.

El ĉi tiuj alilandanoj, plej signifa estis Lauri Laiho. Li naskiĝis en Finnlando, sed pasigis unu jaron en Melburno en 1924. Tiu estis grava vizito, ĉar li ĵetis sin en la Esperanto-movadon. Oni ŝatis lin pro lia afableco kaj li verkis, kun Maurice Hyde, 'Aŭstralio: lando kaj popolo'. La *Sunday Mail* de Brisbano (8a de julio 1928) skribis: "La vidpunkto de malkaŝema alilandano kun tiu de aŭstraliano verŝajne estas unika." Poste li tradukis tiun libron en la finnan lingvon kaj ankaŭ en la finna li verkis libron pri Nov-Gvineo. Liaj belaj verkoj metis lin inter la plej grandaj verkistoj de Aŭstralio.



Inocento Seriŝev en Japanujo

Bedaŭrinde li mortis je la aĝo de nur 37 jaroj.

Inocento Seriŝev, rusortodoksa pastro, kiu fuĝis al Manĉurio el Siberio kiam okazis la revolucio en 1917, poste pasigis multajn jarojn en Japanujo ĝis kiam li traslokiĝis al Sidnejo en 1926. Fervora esperantisto jam en Siberio, li instruis al 125 lernantoj. Li bone konis la staton de Esperanto tra la mondo ĉar li korespondis kun pli ol 80 samideanoj. Lia sociologia raporto kiu komparis Aŭstralion kun Rusujo kaj Japanujo en 1930 estas valora kritiko. Li kondukis la unuan rusortodoksan diservon en Aŭstralio kaj starigis presejon por

eldoni ĵurnalon.

Same absorbita estis Paul Bibron el Francujo. Li migris Aŭstralien kiel junulo kaj komencis instrui dancadon. Li starigis la unuan dancklubon en Melburno, 'Admiralty House'. Generalo Blamey organizis adiaŭan feston kun 400 homoj kiam Bibron emeritiĝis. Conrad Dornbusch, arkitekto de Warwick, Kvinslando, tradukis plurajn verkojn el la hungara lingvo kaj starigis klubon en 1910 en kiu partoprenis pluraj venontaj gravuloj, ekzemple Episkopo Hay de Tasmanio.

W. Schoch estis la svisa konsulo por Kvinslando. En 1905 li prelegis pri Esperanto antaŭ granda homamaso. El ĉi tio komenciĝis ĉiutagaj lecionoj de Esperanto en Queen-Strato, Brisbano.



W Petz kaj Edmund Zochiele

Verŝajne la plej sukcesa propagandisto de Esperanto en Aŭstralio estis Edmund Zschiele el Lepsiko, Germanujo. Aktoro kaj verkisto, li faris mondan rondvojaĝon, piede. Lia intenco estis propagandi pri Esperanto ĉie dum liaj vojaĝoj. Li akiris tutlandan reklamadon en Aŭstralio kiam li alvenis al Fremantlo en julio 1927 post kiam li estis vojaĝinta pli ol 23 000 mejlojn tra Eŭropo kaj Azio. Fakte, en Manĉurio lia kunulo edziĝis al rusino. En la Sinaja dezerto, neĝis kiam li trairis tie. La beduenoj akuzis lin kvazaŭ tio estis lia kulpo. Tamen, li sukcesis eskapi ekzekutiĝon. En Konstantinopolo li pasigis ok tagojn en malliberulejo kiel suspektito de iu krimo.

En Aŭstralio li intencis piediri, sed la grandaj distancoj signifis ke li biciklis tra la kontinento. Tamen, li trajniris de Kalgoorlie al Port Augusta! En ĉiu loko li ricevis reklamadon. Li parolis al multaj grupoj, ekzemple al la Ligo de Nacioj, kaj kompreneble al Esperanto-kluboj, kaj li eĉ parolis radie. Li vizitis izolitajn esperantistojn kaj kuraĝigis la starigon de lokaj grupoj, precipe en Kalgoorlie kaj Newcastle. Li helpis dum la unua Aŭstralio Esperanto-somerlernejo en Newport, Sidnejo.

Mi skribis ĉi tie pri nur kelkaj alilandandoj. Kompreneble ankaŭ multaj Aŭstralianoj klopodis diligente por la Esperanto-movado, sed alilandanoj en Aŭstralio estis kaj unika kaj grava kategorio.

Divenu la urbon – Parto 1-a

DAVID RYAN (WELLINGTON)

En januaro kiam mia familio kaj mi feriis en Meksikio, ni iris en mallonga flugo por viziti ... do, atendu, ne estas tiel facile. Vi devas diveni la urbon kiun ni vizitis. Jen kelkaj fotoj por helpi vin.



Kie mi estas antaŭ trinkejo kiu portas mian nomon – ĉu en Irlando?



En kiu urbo vi trovos statuon de Johana de Arko?

Jen romkatolika preĝejo – povas esti en preskaŭ iu ajn urbo, ĉu ne?



Nun, vidu en paĝo 21

Birdnomoj aŭstraliaj

TERRY MANLEY (NSK)

Antaŭ 10 jaroj dum la somerkursaro en Tathra, NSK, mi gvidis grupon kiu studis bestojn kaj plantojn de tiu regiono. Tiu estis diskutgrupo de esperantistoj kiuj interesiĝis pri naturo kaj mediostudo. Ni promenis kaj rigardis lokajn plantojn, bestojn, kaj birdojn.

Por pretigi min, mi iom studis birdnomojn uzante la libron de Ray Ross "Esperanto-Aŭstralia Vortaro de Aŭstraliaj Birdoj" eldonitan en 1987 kaj mi enkomputiligis kelkajn nomojn de aŭstraliaj birdoj. Kiam Richard Delamore el Sidnejo demandis ĉu mi havas kopion de tiu libro, mi respondis 'jes'. Tamen, ĝi estis kopio de kopio kaj nebonkvalita. Reveninte hejmen mi pensis ke, se iu interesiĝas pri tio, estus bone havi retan liston. Tial, mi komencis enkomputiligi pli el la nomoj de Ray en liston kiun mi prenis el retejo.

Iom pri la historio de ĉi tiu fako en Esperantujo: en 1961 fondigis la Ornitologia Rondo Esperantlingva (ORE). Ĝi renkontiĝis almenaŭ unufoje jare ĉe la UK. Aŭstraliano Wre Chandler estis aktiva en tiu fako. En 1971 eldoniĝis libro 'Komunlingva nomaro de eŭropaj birdoj'. En tiuj jaroj estis sufiĉe granda grupo de personoj kiuj interesiĝis pri birdoj. En Aŭstralio fondiĝis landa grupo kaj en la 1970-aj jaroj ĝi havis ĉirkaŭ 40 membrojn. Sed eble tio estis pro la instigo de kelkaj kaj subteno de amikoj. Wre Chandler eldonis libron 'Komunlingva nomaro de Aŭstraliaj birdoj' en 1982. Estas listigo pri ĝi



Blua Maluro - fotis Paul Green

ĉe la Nacia Biblioteko de Aŭstralio. Mi supozas ke Ray Ross uzis tiun por eldoni sian libreton. En 1998 Brian Fox de Nov-Zelando eldonis 'Komuna Nomaro de Nov-Zelandaj Birdoj.' Iom post iom la ORE-a grupo malpligrandiĝis. ORE iĝis BORE (Biologia kaj Ornitologia Rondo Esperantlingva). Post 2000 ne plu okazis renkontiĝoj.

Dum ekskursoj kaj vojaĝoj oni ofte vidas birdojn kaj ŝajnas ke estas sufiĉa intereso inter 'ordinaraj' homoj pri la nomoj. Mi demandis al grupo dum la kursaro en Brisbano pri birdnomoj. Pri la plej komunaj nomoj, ekz. anaso, ansero, cigno, cikonio, egreto, korvo, pasero, kolombo ktp, plej multaj sciis tiujn nomojn kaj povis priskribi la birdojn. Do, por interkomprenigi unu la alian sufiĉas tiuj nomoj aŭ



Oriente Flava Robeno - fotis Terry Manley

priskribo de la plej elstara trajto de ĉiu birdo. Ekzemple, en la familia grupo Meliphagidae en Aŭstralio estas 66 birdspecoj (laŭ la libreto de Ray Ross

en kiu estas entute 731 birdnomoj). La komunlingva nomo de tiuj 66 estas “honeyeater”, mielmanĝanto. La elstara trajto estas beko iom longa, nelarĝa, kaj kurba por elsuĉi la mielon (aŭ sukeraĵon) el floroj. Oni jam iom scias pri tiu grupo. Kompreneble ju pli oni rimarkas des pli oni plibonigas ekkonon de birdoj. Kompreneble povas esti aliaj birdoj kun simila bekformo, ekz. vadbirdoj, sed oni baldaŭ lernas apartigi tiujn grupojn per grandeco, piedoj ktp.

Do, inter ordinaraĵoj homoj sufiĉas tiu apartigo. Por profesiuloj nur la nomoj en la latina kontentigas ilin. Tamen, estas alia, tria grupo: birdamantoj kiuj daŭre serĉas kaj rigardadas birdojn en naturaj medioj. Wre Chandler certe estis unu el tiuj kiuj profunde studis birdojn, kaj ankaŭ Ray Ross verŝajne. Se vi deziras pli profunde studi birdnomojn, listo el la libro de Ray estas havebla.

Gavino kaj la verda giganto

TOM O'GRADY (KVINSLANDO)

Estis neĝa novjara vespero, frue en sia reĝado, kaj Reĝo Arturo kaj sia korto festis en la halego ĉe Kameloto. La tri grandaj kamenoj flamis varmige, kavaliroj sidis ĉirkaŭ la ronda tablego, kaj la longaj flankaj tabloj estis preskaŭ plenaj. Arturo estis preta por inviti rakonton pri ies aventuro. Li intencis ke tio estu kutimo antaŭ la festeno.

Sed tiam laŭta BUM! sonis kaj la pordegoj kraŝe malfermiĝis. Neĝo enbloviĝis, la fajroj flagris kaj tiam aperis grandega figuro sur granda ĉevalo, kiu antaŭenpaŝis, klak, klak,

klak sur la ŝtona planko.

Sed ne nur la grandeco de la homo mirigis - duoble normala - sed la koloro! Li, liaj haŭto, haroj, barbo, vestoj kaj armiloj - kaj eĉ lia ĉevalo - estis VERDAJ! Kaj la longtenila batalhakilo en lia dekstra mano estis same VERDA.

Dum ĉiuj gapis, la verdulo graŭlegis, ‘Kie estas la ĉefo de ĉi tiu ularo? Mi volas paroli al li!’. Li elseliĝis.

Diris Arturo, ‘Mi estas Arturo, Reĝo. Se vi venas en paco, vi rajtas

partopreni nian festenon.’

Li ĉirkaŭrigardis, ‘Kiu defias?’

La aŭskultantoj ŝajnis esti ŝtonigitaj.

‘Ha! Ĉu ĉi tiuj estas la famaj batalistoj en la korto de Reĝo Arturo?’

Arturo mem ekstaris por akcepti la defion. Sed en tiu momento voĉo sonis de flanko, ‘Moŝto, mi petas vian permeson por akcepti ĉi tiun aventuron. Vi scias ke mi deziras gajni lokon ĉe la ronda tablo. Kaj cetero ni ne volas riski vian vivon!’ La parolanto estis Gavino, juna nevo de la Reĝo, ankoraŭ ne kavaliro. Arturo konsideris nelonge kaj tiam respondis, ‘Jes, nevo, vi rajtas, kaj mi esperas ke vi ne bedaŭros!’

Gavino iris al la verdulo kaj ricevis la verdan hakilon el lia mano. La giganto surgenuiĝis, streĉis sian kapon antaŭen, kaj brosis la verdajn harojn for de la nuko. ‘Nun, mi pretas. Haku!’

Gavino staris, svingetante la hakilon por provi ĝian pezon kaj ekvilibron.

‘Haku, mi diris! Ĉu vi timas?’

Gavino levis la armilon alten super la kapon kaj per tuta sia forto svingis ĝin malsupren, sur la verdan kolon. La kapo saltis de la ŝultroj kaj forruliĝis inter la kavaliroj kiuj retroiris de ĝi. Sed la korpo ne falis; ĝi ekstaris! kaj paŝis al la kapo, levis ĝin per la haroj, marŝis al la ĉevalo, enseligis sin, kaj turnis la kapon en siaj manoj al Gavino.

Ĝi diris: ‘Ĝis la Verda Kapelo! Post ne pli ol unu jaro kaj unu tago. Rekte norden tra la Arbaro Sovaĝa. Vi trovos min.’

Kaj la monstro kaj ĉevalo eltrojis kaj

malaperis en la neĝan nokton. Post longa paŭzo de miro kaj ŝoko, harpado rekomenciĝis, kaj ekscita parolado ĉie, kun nur unu temo dum la tuta festeno.

Sed poste, dum monatoj da rutino, oni plejofte forgesis ke magio penetris la korton de la Reĝo. Sed Gavino ne forgesis, ne povis forgesi. Ĉu ĉi tiu jaro estos la lasta en sia juna vivo? Tio estis ofta, turmenta penso, sed li ne pensis pri la eblo ne fari la rendevuon. Tio estus malnobla.

La semajnoj, monatoj, sezonoj ruliĝis senindulge antaŭen. Ŝajne baldaŭ estis Mikaelmeso, kaj post morna adiaŭo al siaj amikoj, kiuj ne atendis revidon, Gavino, kun siaj armiloj kaj provianto, enseliĝis sur Gringoleto, lia granda griza militĉevalo, kaj ekiris norden.

La vojaĝo tra la stranga, mistera, ombra Arbaro Sovaĝa estis longa testo de fizika kaj mensa elteno. La vetero pli kaj pli vintrigis, foje pluvis, ofte li devis dormi sur la grundo, kaj dufoje li devis forbatali banditojn, kaj unufoje lupojn, kaj de tempo al tempo mankis nutraĵoj.

Kiam ajn eble li demandis pri la Verda Kapelo, sed neniu konis ĝin. Fine Kristnasko proksimiĝis, kiam li eliris la arbaron en kultivitan terenon kun bela kastelo en la mezo. Kia plaĉa vido! Estis Kristnaska Vespero, kaj li atendis bonvenon. Kaj ĝuste tion li ricevis kiam li frapis sur la pordegojn per sia glavtenilo. La pordisto vokis la Kastel-lordon kiu ja varme bonvenigis Gavinon. Baldaŭ Gringoleto estis prizorgata, kaj ankaŭ Gavino: varma bano kaj varmaj vestoj en la

gastĉambro kaj tiam varma bovlego da manĝaĵoj en la halo, kun bona tasego da biero.

Gavino trovis la Lordon, fortan, iomete grasan mezaĝulon kun la nomo Bertilako. Li trovis lin tre simpatia, kaj ili parolis amike dum duona parto da la nokto. Tamen, la postan tagon kiam li ricevis inviton por restadi laŭplaĉe, li devis klarigi pri sia nepro trovi la Verdan Kapelon antaŭ la novjara tago.

Lia gastiganto ridis kaj diris, 'Mi bone konas tiun Kapelon; ĝi estas nur duhoran rajdon for. Tial vi povas senĝene ripozi ĝis tiu tago! Mi provizos por vi gvidanton.'

Post lia vojaĝo ripoztagoj estis tre plaĉaj, precipe ĉar Edvina, la bela edzino de Bertilako, tre atentis pri li. Sed baldaŭ restis nur kvar tagoj. Tiam Bertilako venis kaj diris, 'Mi kutimas ĉasi bestojn en la lastaj tri tagoj de la jaro, kaj mi proponas ludon! Mi donos al vi kion mi kaptos, kaj vi, restante, donos al mi, kion vi gajnos!'

Gavino akceptis la ludon en bona humoro. La sekvan tagon li vekiĝis malfrue, kaj trovis ke sidas sur la flanko de la lito Edvina! Ŝi babilis al li malserioze kaj amuze, kaj li suspektis ankaŭ kokete. Tion li ŝajnigis ne konstati, sed ŝi lasis lin kun varma kiso!

Tiun vesperon Bertilako revenis kun la korpo de juna cervo kiun li prezentis kun ŝerca ceremonio al Gavino. 'Kaj kion vi havas por mi?' Gavino paŝis al li, tenis liajn ŝultrojn, kaj kisis liajn lipojn!

Lia gastiganto ridis. 'Kie vi akiris tion?'

'Ne demandu! Tio ne estis parto

de la aranĝo!'

La sekvan matenon okazis same. Li vekiĝis kaj trovis Edvina apude. Ŝi same babilis amuze, kaj Gavino pensis pli kokete - kaj eĉ tente! Sed li ne respondis - kaj ricevis du kisojn ĉe apartiĝo!

Vespere, Bertilako 'donacis' grandan apron, kaj Gavino du kisojn!

La sekva tago estis la antaŭlasta tago. La petolema Edvina fine ŝajne senpacienca kaj diris, 'Mi ne kredas ke vi estas unu el tiuj amoremaj batalistoj ĉe la korto de Reĝo Arturo!'. Gavino klarigis ke li ne volas rompi la Kavaliran Kodon, la devon de gasto al gastiganto.

'Vi estas miraklo de pureco! Tamen, ni interŝanĝu memoraĵojn.'

'Bedaŭre mi ne havas ion por doni. Mi vojaĝis tre malpeze ŝarĝita.'

'Jen bela verda rubando, brodita. Portu ĝin por memori pri mi.'

Gavino protestis, 'Mi ne rajtas! Vi havas propran Lordon.'

'Vi iros en danĝeron, ĉu ne? Ĝi havas fortan protektan sorĉon, kaj vi povas porti ĝin kaŝita!'

Gavino pensis pri la verda giganto kaj akceptis la rubandon. Ili apartiĝis ĉi lastan fojon kun tri kisoj!

Tiun vesperon Bertilako donis nur vulpan pelton sed ricevis tri kisojn, kaj ne la rubandon, kaŝitan ĉirkaŭ la talio de Gavino.

La sekvan tagon Gavino vekiĝis frue, preparis kaj armis sin, kaj ricevis, en tre bona stato, Gringoleton el la stalo. Li kaj sia gvidanta eskviro rajdis pli norden, tra tre varia tereno, ĝis kiam ili venis al profunda valo plena je verdeta nebulo. 'Iru tien kaj vi trovos

la kapelon en la mezo. Nun, adiaŭ!'. La eskviro foriris tre rapide.

Gavino plonĝis malsupren laŭ la deklivo, tra verdaj foliaro kaj nebulo, ĝis la roĝo en la profundo. Tie li ne vidis kapelon, sed la silento estis rompita de sono: knar-knar-knar, kvazaŭ akriga ŝtono sur falĉilo. Tiam li aŭdis ke ĝi venas el verda monteto antaŭa. Li elseliĝis, kaj elkriis:

'He, Verdulo, jen mi, Gavino, antaŭ ol jaro kaj tago pasis!'

La memorata muĝanta voĉo laŭtis, 'Mi venos kiam la hakilo estos sufiĉe akra.'

Baldaŭ la verda giganto aperis, hakilhava, el la malhela bazo de la verda monteto.

'Ĉu vi pretas?' li graŭlis. Gavino surgenuiĝis. 'Haku!' Li kriis, sed en la momento kiam la hakilo zumis malsupren, li tiris flanken sian kapon.

'Ho! Ĉu mi agis tiel kiam vi hakis?'

'Ne, sed mi ne scias remeti mian kapon! Tamen, haku duafoje - mi ne moviĝos.' La verda giganto svingis, kaj la klingo sinkis en la grundon apud la kolo. 'Ne ludu! Haku ĝuste,' kriis Gavino. La verda giganto faris tiel, kaj la klingo ĉifoje entrancis flankan vundeton. Gavino saltis for, elingigis sian glavon, kaj diris, 'Sufiĉe! Vi vundis min, mia sango fluas. Mi finis la ludon!' Tiam li vidis ke antaŭ li staras ne la minaca giganto sed la amikema gastiganto, Bertilako!

Konsternita, mirigita, Gavino balbutis, 'Bertilako! Kio? Kial? Kiel?'

Bertilako diris, 'Ne utilas demandi kial pri magio! Sciu ke mi estas sorĉita. Kaj sciu ankaŭ ke nur pro la tria tago mi vundetis vin, pro la

rubando ne donita!'

Ekhonte, Gavino elmontris la rubandon por doni sed Bertilako diris 'Ne, mi pardonas tion; ĝi estis nur pro juna vivamo.'

Ili reiris kune al la kastelo sed Gavino baldaŭ foriris. Li ne plu sentis sin komforta en la ĉeesto de la stranga, dunatura - ja dupersona - Bertilako!

Ni povas supozi ke li faris la longan reiran vojaĝon kun pli gaja koro ol antaŭe!

Gavino estis ĝoje bonvenigita ĉe Kameloto - ĉiuj kredis lin mortinta. Ĉe granda celebra kunveno, kiam li rakontis sian aventuron, li finis per montrado de la verda rubando, lia 'kulp' . 'Mi intencas porti ĝin dum tri jaroj, por memori min pri la sankteco de promesoj.'

Multaj protestis: Tio estas tro! Vi ne tre kulpis! Nur bagatelo! Ne grave! ktp.

'Tamen, mi faros!' insistis Gavino.

'Kaj ankaŭ mi; vi ne estos sola!' kriis la kavaliro Persivalo. 'Kaj mi!' diris la kavaliro Lanvalo, kaj baldaŭ multaj, tiam ĉiuj elkriis same. Tial ĉiuj kavaliroj de Reĝo Arturo portis verdan rubandon dum tri jaroj.

Nokto en la aŭstralia boŝo: intensa soleco

CHARLES STEVENSON (ADELAJDO)

En 1912 Conrad Dornbusch, arkitekto de Warwick, Kvinslando kaj ankaŭ vigla esperantisto, skribis unu el la plej fruaj esperantaj verketoj el Aŭstralio: ‘Nokto en la aŭstralia boŝo’.

Dornbusch, hungaro, jam starigis klubon en Warwick antaŭ 1912 en kiu partoprenis kaj la loka polica juĝisto kaj la venonta episkopo de Tasmanio. ‘Nokto en la aŭstralia boŝo’ asperis en iu rusa tagĵurnalo en 1912, kaj jene ĝi estas eldonata en Esperanto la unuan fojon!

Ekde la kvara posttagmeze mi atendis ke iun momenton mi vidos tra la arbaro la foran vidaĵon de la Munduroo-a paŝta domo. Mi estis en montara kaj arbardensa kamparo kaj ŝajne mi sekvis la malĝustan vojeton. Ke tiu malfeliĉo povus okazi oni avertis min kiam mi ekiris en la mateno. La ĉevalo laciĝis. La suno eksubeniris. Tre ŝajnis al mi ke mi devas ĉi tie mem tendumi dum la nokto. Kiom sovaĝaj kaj solecaj estas la ĉirkaŭaĵoj.

Post kiam mi maljungis la ĉevalon, mi ekbruligis fajron por kuiri. La kriado kaj kantado de la boŝaj birdoj eksilentigis la boŝon. Kukaburo blekridis lastfoje antaŭ ol noktiĝis. La tenebro, mallonga mi rimarkis, kreis scivolan humuron al la boŝaj bestoj. Ĉiuj silentiĝis, escepte de la murmuro de akvo ŝprucetanta kontraŭ ŝtonoj en la rivereto.

Plimallumiĝis. Mi preskaŭ ne plu povis vidi la kabrioletan. Nun metala rankvakado ekaŭdiĝis. Mi aŭdis la susuron de la vento tra la arboj je la supro de la montfendo. Kiam venteto skuas

la arbosuprojn ŝajnis al mi kvazaŭ suspiro de iu granda besto kaj poste venis forta vento tiel ke eĉ kaj la arbotrunkoj kaj rokoj plendis. Tiam silentiĝis ĉiuloke, krom ondetoj kaj, de tempo al tempo, rankvakado, kaj la malagrabla krio de noktaj birdoj kiam ili flugis supre. Ĉiuj sonoj nur multigis la potencon de silenteco.

Soleco maltrankviligis min. Mi tute ne kutimiĝis al la nokta boŝo.

Mi eklumis la acetilenan lanternon de la kabrioleteto, kaj forte forĵetis malagrablaĵon kiu kvazaŭ superŝutis min. Frapis min ke mi deklamus poezion, io kion mi lernis kiam mi estis studento.

Post la unua strofo mi haltis por spiri ... kaj aŭdis klare aplaŭdon manan, kaj intermiksitaĵn vortojn de laŭdo, kvazaŭ ie la anima mondo disputis. Tio ekterurigis min. Kio okazis ĉiloke?

Refoje ĉio trankviliĝis. Apude, estis la aĉa krio de noktobirdo. Samtempe birdo alkroĉis sin de la lanterno kaj falis teren senkonscia. Mi ekpomenis al la birdo por levi ĝin kiam denove sonis la mistera aplaŭdo. Sed ĉi tiun fojon la sono venis de sub la seĝo de la kabrioleteto. Tie mi trovis malgrandan birdon kaptitan kaj vane batantan por eskapi.

Nun mi komprenis ke la acetilena lanterno allogis la birdon, sed mi ne scias kiel iamaniere ĝi kaptiĝis sub la seĝo kie la albatado gajnis mian maltrankvilan cerbon kiel manlaŭdo.

Certe nun estas la tempo, mi konsilis min, por ripozi.

Pioniroj de Esperanto en Kvinslando

KATJA STEELE (ADELAJDO)

Hilary Chapman estas brita esperantisto kiu kun ĝuo kaj talento spuras en la historio. Li skribas interesajn artikolojn ne nepre pri aŭ en Esperanto kaj aperigas ilin en Britio. La subaj informoj estis senditaj al mi por libera uzo kaj mi ĝojas pludoni ilin al vi. Estus tre bone se vi povus kompletigi tiujn ĉi informojn per konservitaj dokumentoj, fotoj, leteroj ktp.

La unua libro de Esperanto estis publikigita en 1887 en la tiama rusa imperio. Ĉirkaŭ 1900 la universala lingvo komencis havi adeptojn ankaŭ en la brita imperio, kies parto Aŭstralio estis kaj ĝis nun restas.

La nomoj kaj adresoj de 16 fruaj parolantoj de Esperanto en Kvinslando troviĝas en diversaj numeroj de la Adresaro de Esperantistoj aperintaj inter januaro de 1905 kaj januaro de 1909. Ĉiu el la sube listigitaj havas unikan apartan numeron kiu ne aperas ĉi tie. Tamen, la pioniraj uzantoj de la lingvo ofte subskribadis artikolojn nur per tiu sia numero sciante ke iu ajn kiu volas kontakti ilin povis facile trovi adreson en la publikigita Adresaro.

Jen la nomoj de la kvinslandaj pioniroj de antaŭ pli ol jarcento:

Eldono XXV, 1904-01-01 ĝis 1905-01-01:

Richard RENDLE M. R. C. S., Swan's Road, Taringa, Brisbane

Eldono XXVI, 1905-01-01 ĝis 1906-01-01:

R. J. THOMSON, 103, Queen St, Brisbane
W. SCHOCH, Telegraph Chambers, Queen St, Brisbane

Eldono XXVII, 1906-01-01 ĝis 1907-01-01:

Prescot P. FEWINGS, Barrister at Law, George St, Brisbane

G. A. WALLER, Herberton

Lieut.-Col. C. F. PLANT, Ashgrove, Brisbane

S-ino W. FISON, O'Connell St, Kangaroo Point, Brisbane

F-ino Marion FRASER, Charlotte St, Brisbane

S-ino E. M. WALLER, Herberton

Robert RENDLE, Registrar of Friendly Societies, Brisbane

S-ino BROCKWAY, Wickham Terrace, Brisbane

J. H. CADELL, Mines Dept., Treasury Buildings, Brisbane

S-ino Edith BRYAN, Deaf and Dumb School, South Brisbane

R. M. RICE, Toowong, Brisbane

Eldono XXVIII, 1907-01-01 ĝis 1908-01-01:

S-ino Katherine R. NICHOLSEN, Shafston Rd, Kangaroo Point, Brisbane

Richard RENDLE, J. R.-C. S. Eng., Swan Rd, Taringa, Brisbane

Estas pli da viroj ol virinoj en tiu ĉi listo, kio por la socio de tiu tempo ne estas surpriza.

Post 1908 ne plu necesis registriĝi por Esperanto, kaj lernolibroj pri Esperanto en diversaj lingvoj, inkluzive la anglan iĝis pli oftaj. Kiuj serĉis Esperanto-kontakton en aliaj landoj por tiuj servis pligrandiganta elekto de revuoj.

Jen pli da informoj pri kelkaj el la listigitaj esperantistoj.

Richard Rendle (1846-1907) studis en Londono en la Hospitalo Guy. Post kiam li ĉesis studi li iĝis san-prizorganto sur ŝipo de elmigrantoj vojaĝantaj al Aŭstralio. Li restis en Aŭstralio kaj ni scias ke iam en la pli malfruaj jaroj li laboris proksime al Brisbano en Taringa kie li ankaŭ mortis la 10-an de aŭgusto 1907. En katalogo de instrument-farintoj, masko por la uzo de biklorido kaj metileno ricevis sian nomon laŭ li. Rendle estis sendube la unua persono kun scio de Esperanto en Kvinslando. Ni ne scias kial lia nomo aperis en la listo dufoje.

W. Schoch estis instruisto de stenografio.

Prescot Postlethwaite Fewings (1870-1917) estis klare advokato.

Charles Frederic(k) Plant (1843 - 1932) naskiĝis en Nottingham, Anglio. Li elmigris al Aŭstralio kiel juna viro en la kompanio de sia frato E.H.T. Plant. Ili vojaĝis al la or-kampoj de Palmer River kaj aliaj partoj de norda Kvinslando serĉante oron kaj aliajn valorajn metalojn. Plant translokiĝis al Brisbano en 1898 kaj vivis en ĝia antaŭurbo Ashgrove dum la resto de sia vivo.

S-ino E. M. Brockway estis edzino de medicinisto kiu estas en la listo.

R. M. Rice, Toowong, estis knabo en Brisbane Grammar School kiam li lernis Esperanton. Li iĝis elstara lingvisto.

Edith Bryan (1872-1963), instruistino de surduloj, naskiĝis

la 29-an de junio 1872 en Derby, Anglio. Laŭ *Australian Dictionary of Biography*, ŝi laboris kiel estrino de la lerneja fako de la Kvinslanda Instituto por Blinduloj, Surduloj, kaj Mutuloj en Brisbano en novembro 1901. Oni priskribis ŝin kiel "trankvile forta virino kun natura digno".

Ni povas demandi kio estis la motivo de tiuj ĉi homoj por lerni iun relative novan lingvon. Ĉu ekzistas ie protokoloj de la fruaj societoj? Ĉu iu el tiuj ĉi entuziasmoj postlasis al la postaj generacioj leterojn aŭ poŝtkartojn en nia lingvo?



Honore al Lidia Zamenhof

PAUL DESAILLY (SUD-AŬSTRALIO)

*Lidia Zamenhof, kosmopolita virino kaj viktimo de la Holokaŭsto**
(originale en la angla lingvo verkis Renato Corsetti, Londono, kaj
tradukis Esperanten Paul Desailly)

Lidia Zamenhof estis instruisto, verkisto, kaj tradukisto kaj la plej juna filino de Ludwik Lejzer Zamenhof, kreinto de la internacia helplingvo Esperanto. Ŝi naskiĝis la 29-an de januaro 1904 en Varsovio, tiutempe en dividita Pollando; ŝi iĝis tre sukcesa aktivisto de Esperanto kaj la bahaa kredo.

Ŝia historio estas rakontita de Wendy Heller en biografio *LIDIA: The Life of Lidia Zamenhof, Daughter of Esperanto* (el la angla tradukis Bernhard Westerhoff en 2007; havebla en Esperanto ĉe FEL (Antverpeno) kaj aliloke).

Post fino de universitataj studoj pri juro en 1925, Lidia Zamenhof plene dediĉis sin al disvastigado de Esperanto kaj de la homamaj idealoj ligitaj kun ĝi. En la sama jaro, dum la 17-a Universala Kongreso en Genevo en 1925, ŝi konatiĝis kun la bahaa kredo kiun ŝi post nelonge arde dissemis. Bahaismo estas relative freŝa religio (fondita en la 19-a jarcento en Persio) kiu emfazas la spiritan unuecon de la tuta homaro. La fondinto, Bahá'u'lláh, instruis ke ĉiuj religioj venas el la sama dia fonto kaj ke la nepra bezono alfrontata de la homaro estas trovi unuigan vizion pri la estonteco de la socio, kaj de la naturo kaj celo de vivo.

Kiel profesia Esperanto-instruisto Lidia Zamenhof faris multajn propagandajn vojaĝojn kaj gvidis pli

ol 50 Esperanto-kursojn en diversaj eŭropaj landoj uzante progreseman, rektan instrumentodon. Krome, ŝi estis kontribuanto al gravaj Esperanto-gazetoj kiel *Literatura Mondo* kaj aliaj revuoj. Ŝiaj temoj inkluzivas instruadon kaj disvastigon de Esperanto kaj evoluigon de la Esperanto-movado, studojn pri pola literaturo kaj la instruoj de la bahaa kredo. Ŝia Esperanta traduko de *Quo Vadis* de Henryk Sienkiewicz aperis en 1933. Ŝi ankaŭ tradukis plurajn volumojn de bahaaj skribaĵoj, precipe la majstra verko de John Ebenezer Esslemont, *Baha'u'llah and the New Era*, kiu estas taksita la plej efika enkonduka lernolibro de tiu religio.

En 1937 Lidia vojaĝis al Usono por instrui Esperanton kadre de kunlabora iniciato de la Esperanto-Asocio de Norda Ameriko kaj la Nord-Amerika Asembleo de la Bahaa Kredo. Ŝi estis devigata je la fino de 1938 foriri kiam la vizo eksvalidiĝis kaj, malatente pri la pledoj de amikoj, ŝi revenis al Pollando baldaŭ antaŭ la komenco de la Dua Mondmilito. Malpli ol unu monaton post la germana invado, la zamenhofa hejmo en Varsovio estis bombita. Lidia estis arestita kune kun sia frato Adamo, lia edzino Wanda, kaj sia fratino Zofia. Adam Zamenhof estis mort-pafita en januaro 1940 kiel unu el la 50 malliberuloj murditaj en reprezalio por rezista atako al nazia oficiro. Lidia, Zofia, kaj Wanda estis



Lidia Zamehof (dua de maldekstro) ĉe la 22-a Universala Kongreso en Oksfordo, 1930

liberigitaj post kvin monatoj kaj senditaj al la varsovia geto por tie vivi. Tie Lidia klopodis helpi aliajn por ricevi medikamentojn kaj nutraĵojn. Ŝi la ŝancon eskapi ricevis de polaj esperantistoj kaj de germana baha soldato, sed ne volante endanĝerigi aliajn ŝi malakceptis la invitojn.

Sia lasta konata letero diras: “Ne vin endanĝerigu; mi scias, ke mi mortos sed mi sentas ke estas mia devo resti kun mia popolo. Donu Dio, ke el niaj suferoj pli bona mondo aperos. Mi kredas je Dio. Mi estas bahaano kaj mortos kiel bahaano. Ĉio estas en Liaj manoj.” Tamen, ŝi mortis kiel judo, esperantisto, kaj membro de la familio Zamenhof. Hitlero nekontesteble klarigis sian opinion en *Mein Kampf* ke judoj intencas uzi Esperanton por regi la mondon kaj la Gestapo-estro en Varsovio ricevis ordonojn rekte el Berlino ke la zamenhofa familio devas esti arestita.

La lasta informo kiun ni havas pri Lidia estas de Esther Schor kiu skribis en verko aperinta en Nov-Jorko en 2015: *Bridge of Words: Esperanto and the Dream of a Universal Language*.

Apud la fino de septembro 1942, je la aĝo 38, ŝi estis inter la 300 000 judoj de la varsovia geto kiuj estis ŝovitaj en

brutvagonojn kaj senditaj al Treblinka. (Zofia foriris libervole, eble pensante ke ŝi povus servi kiel kuracisto.) Eva Toren, tiam 14-jaraĝa knabino, kiu en tiu printempo amikiĝis kun Lidia dum geto-sedero (t.e. religia rito por judoj), postvivis la holokaŭston por memori la finajn horojn de Lidia en Varsovio. En 1993 Toren memoris la naziojn kiuj vipante kaj laŭte kriante puŝis judojn al la Umschlagplatz (t.e. kolekto-punkto por ‘ordigi’ la viktimojn) kie ili staris sen akvo de frumatenato ĝis vespero. Posttagmeze, la germanoj kune kun siaj polaj servantoj aranĝis por selektado de judoj en linioj longaj je kvin homoj. Lidia lokiĝis plurajn vicajn malantaŭ Eva. Ili interŝanĝis simpatian rigardon de kunsentado. Kiam ŝi estis selektita por deportado, Lidia “piediris reĝindigne, dorsrekte, kun fiero, malkiel la plejparto de la viktimoj, kiuj estis kompreneble en paniko.” La 5-an de septembro, Lidia Zamenhof entrainiĝis al Treblinka, kie, je alveno, ŝi en gaskamero estis murdita.

* artikolo en la angla lingvo havebla ĉe <http://blogs.bl.uk/european/2017/01/lidia-zamenhof-a-cosmopolitan-woman-and-victim-of-the-holocaust.html>

Gavino kaj la hida damo

TOM O'GRADY (KVINSLANDO)

Iun novjar-vesperon la juna Reĝo Arturo, laŭ sia kutimo, festis kaj festenis la okazon en la halego ĉe Kameloto. Tre kontenta pro la tiam (relativa) sekureco de sia regno, Arturo rigardis siajn ĉefajn kavalirojn kiuj gaje ĉirkaŭsidis la faman rondan tablegon kaj anoncis 'Kamaradoj, antaŭ ol ni komencu la festenon, laŭ kutime mi demandas: Kiu el vi rakontos novan interesan aventuron vian?'

Sekvis embarasa silento.

'Kio!! Ĉu neniue el miaj bravaj kavaliroj faris ion ajn?'

Nur Gavino, lia nevo, kuraĝis respondi, 'Moŝto, la regno estas tre paca nun. Neniu aŭdacas defii viajn leĝojn aŭ fari fian magion!'

Kun plenevidenta malplaĉo la Reĝo deklaris 'Post tri tagoj mi mem iros sola tra la lando por kontroli ĉu la regno estas en tiome perfekta ordo! Kaj nur tiam la festeno povis okazi.'

Kaj jen post tri tagoj, malgraŭ avertoj, Arturo, konfidanta la region al Gavino, kaj sen eĉ unu eskviro, surseliĝis plenarmite kaj forgalopis.

Post pluaj tri tagoj li eniris la Arbaron Sovaĝan, strangan regionon de magio kaj strangaj okazaĵoj, kiu tiam kovris grandan parton de Britujo, kaj plueniris en ĝian depriman ombregon. Dum aliaj tri tagoj li vidis neniun, sed nun, trans rivereto, malhela kastelo aperis. Vesperigis, kaj dezirante gastigon, li do levis sian kornon kaj blovis laŭte por sciigi sian ĉeeston. Venis tuj de la kastelo ne la

atendita invito, sed jen:

'He, laŭtulo, iru for de mia tero, tuj, aŭ mi venos forigi vin! Kaj ne pasu en mian rojon, mi avertas!' Kaj nigra virego surĉevala elvenis kaj trotis al la rivereto.

Arturo ekkoleris, kaj prenis glavon kaj ŝildon pretajn. 'Mi estas Arturo, la Reĝo, kaj mi rajtas iri ĉien ajn en mia regno!'

'For, mi diris, trudulo! Kaj ne metu hufon en mian rojon, aŭ vi bedaŭros!'

Kolrega, Arturo spronis antaŭen en la akvon por puni la insultanton, kaj en la momento kiam li tuŝis tiun akvon terura letargio falis sur lin, la armiloj falis de la feblaj brakoj, la malfortega korpo ruliĝis de la selo en la fridan rojon. Tie li kuŝis, tremanta pro malvarmo, kaj apenaŭ kapabla eĉ paroli.

Lia malamiko transvadis kaj prezentis glavopinton ĉe la senprotektita gorĝo, 'Nu, *REĜO*, ĉu vi cedas?'

Arturo spasme mumuris, 'Mi - volus - renkonti vin - sen via - damnita magio.'

'ĈU VI CEDAS? La glavo pikis lian gorĝon. En hontego Arturo konsideris: Ĉu tuja morto? Aŭ ĉu cedi kun la espero iam eskapi? 'Mi cedas.' li direktis.

La virego trenis lin kaj liajn armilojn el la akvo. Arturo povis ekstari.

'Nun vi estas mia kaptito. Sed vi estas la unua reĝo por mia subtera karcero. Mi do devas proponi elaĉetan taskon por EBLE liberigi vin. Ĉu vi akceptas?' Nesurprize ke Arturo

akceptis. Flustris la grandulo, 'Antaŭ ol unu jaro kaj unu tago pasos vi devas doni la ĝustan respondon al la demando: **KION ĈIU VIRINO PLEJ DEZIRAS?**'

Tenata de sia propra vorto, Arturo devis obei: li ekiris serĉi - ĉie, krom Kameloto, kien li hontis iri. Li akiris libron en kiu skribi respondojn kaj komencis pridemandi ĉiun virinon renkontatan - ĉe vilaĝoj, kasteloj, urboj, etaj farmbienoj, riĉaj nobeldomegoj, kaj ankaŭ ĉe inoj ĉiaj - freŝaj junaj virgulinaj, novaj edzinoj, patrinoj mult-infanaj kaj maljunulinoj mortopretaj, ĉu riĉaj aŭ senhavaj.

Sed Arturo trovis la respondojn treege variaj: bela kompleza edzo, propra beleco, sufiĉaj manĝaĵoj, riĉeco, juveloj, kelkaj bonaj laktobovinoj, amemaj infanoj, belaj vestoj, nova plugilo, princina rango ktp ktp. Sed kiu estas la ĝusta? Arturo plenigis sian libron sed tre dubis ke iu ajn pravas. Do li daŭris serĉi, semajnon post semajno, monaton post monato, en kreskanta despero ĝis fine la limdata minacis. Arturo, ne trovinte kion ĈIU virino deziras, devis turni sin por reiri al la malhela kastelo, kaj sia sorto.

Dum li rajdis reire, senespera, en la Arbaron Sovaĝan, Arturo ne remarkis virinon apud la pado ĝis kiam raŭkega voĉo kriis, 'Saluton, Reĝo Arturo; Dio benu vin!' Turnante sin por rigardi, li apenaŭ kredis siajn olulojn: la maljuna damo, sidanta sub kverkego, kvankam riĉe vestita, estas kurbita kaj malrekta en ĉiu membro, la unuokula misformita vizaĝo estas ĉifita veruk-plena amaso, kaj la hararo griza implikaĵo. Dum li rigardadis, la damo diris:

'Nu, Reĝo, ĉu vi ne havas vorton por maljuna doma?' Arturo subite memoris ĝentilecon. 'Pardonon, Sinjorino, dankon pro via afabla saluto. Mi estis tro pensplena pri propra ĝeno.'

'Mi konas vian ĝenon, Moŝto, kaj povas helpi vin.'

'Se jes, S-ino, mi rekompensus per io ajn kion vi petas.'

'Akceptite! Venu proksimen, kaj mi flustros.' Ili faris tion, kaj Arturo kriis, 'Jes, sendube la ĝusta respondo! Dankon! Nun, kion vi deziras?' La damo estis tutpreta: 'Vi devas venigi ĉi tien belan, junan, bravan kavaliron kiu pretas geedziĝi kun mi!' Arturo protestis sed la damo simple ripetis 'Vi donis vian vorton, vi donis vian vorton' ĝis kiam li devis akcepti.

Li plueniris al la malhela kastelo. Tie ĉe la rivereto, atendis lin la minaca nigra virego, 'Donu la ĝustan respondon, nun!' Arturo malfermis sian libron kaj komencis reciti ĝiajn respondojn.

'Ne, ne, NE!' kriegis la nigrulo. Li ekprenis la libron kaj forĵetis ĝin.

Arturo, kiu intence retenis ĝis lasta la respondon de la damo, diris 'Mi havas unu lastan. Jen ĝi: **ĈIU VIRINO PLEJ DEZIRAS SIAN PROPAN VOLON.**' La virego ekkoleregis. 'Mia fratino estas instruinta vin!! Vi estas libera! Nun kuru for tuj, antaŭ ol mi rekaptos vin!'

Arturo ekiris al Kameloto; unu ĝeno jam for, sed aliaj restis. Tie li estis ĝoje bonvenigita. Oni timis lin iel forperdita.

Ĉe la unua kunveno li devis rakonti sian embarasan aventuron kaj finis dirante: 'Do, vi komprenas, kamaradoj, ESK | paĝo 19 | 127 | junio 2017

ke mi nepre devas provizi edzon por la damo. Ĉu estas volontulo?'. Sekvis silento, krom movetoj de la botoj de la fraŭloj. Kelkaj en la malantaŭo malaperis. Plua silento.

Arturo preskaŭ petegis: 'Mi promesis! Mi scias ke la damo ne belas, sed ŝi havas komplezan koron. Kaj mi, la Reĝo, ne povas false ĵuri!' Plua silento.

Fine la kavaliro Gavino parolis. 'Prave, la Reĝo ne povas havi reputacion false ĵuri. Mi akceptos la damon kiel mian edzinon!'

La Reĝo rigardis lin serioze kaj kun admiro, 'Ĉu vi certas, nevo?'

'Jes, Moŝto, mi donis mian vorton!' estis la respondo.

Tiel estis ke granda grupo de kavaliroj rajdis kun Arturo kaj Gavino por rendevui kun la damo. Ili trovis ŝin sub la sama kverko, same hida. Ĉiuj rigardis en silenta hororo.

Sed Gavino paŝis antaŭen al la damo. Li riverencis al ŝi kaj diris 'Sinjorino, mi estas Gavino, la edzo kiun Reĝo Arturo proponas por vi. Ĉu vi akceptas min?'.
'Jes, mi estas honorata,' raŭkis ŝi responde.

Kelkaj ridaĉoj aŭdiĝis malantaŭ li.

Li turnis sin, man-en-mane kun la damo, kaj kun severa mieno rigardis la aliajn. 'Sciu ke iu moko al la damo estos sama kiel moko al mi. Ĉu iu volas disputi tion?' Absoluta silento regis.

Gavino instalas la damon sur linda blanka ĉevalo kaj ŝi rajdis apud li sur la vojaĝo al Kameloto. Tie multaj apud la vojo gapis, vidante ŝin, sed la aspekto de Gavino apuda silentigis mokadon.

ESK | paĝo 20 | 127 | junio 2017

En la fortikejo, Ginevra, la belega Reĝino, prizorgis ŝin kaj la preparojn por la geedziĝa ceremonio en la sekva tago. Ĉe la celebra festeno la damo ŝajnis nigra skarabo inter multaj gaje koloraj papilioj, kaj dum la posta unua danco por la paro ŝiaj stumbloj estis aŭ kompatindaj aŭ ridindaj, laŭ la karaktero de la vidanto.

Sed fine venis la horo kiam la paro devis foriri al la preparita dormoĉambro kaj pretigi sin por dormo. Gavino unue eniris la liton kaj atendis la damon. Li aŭdis ŝin enrampi kaj, malgraŭ sia plej bona intenco, turnis al ŝi sian dorson kaj fermis la okulojn.

Tiam li aŭdis dolĉan, beltonan voĉon: 'Ĉu mia tute nova edzo ne havas eĉ unu etan kison por mi?'

Subite plenvekita, li trovis enlite kun si la plej belan, ĉarman, junan virinon kiun li iam ajn vidis (krom eble Ginevra, la Reĝino).

'Ĉu vi estas la damo?' li balbutis.

'Jes, kara, mia nomo estas Meleflora.' Baldaŭ ili estis en intima ĉirkaŭbrako kaj ŝi klarigis: 'Fia malamiko per malbona magio sorĉis min kaj mian fraton, kaj nian kastelon. Mia frato iĝis nigra giganto, kaj mi la hida damo. Nun via edzinigo de mi duonigis la sorĉon kaj mi povas esti bela aŭ nokte aŭ tage. Kaj VI povas elekti kiun: ĉu nokton aŭ tagon?'.
'Mi? Kompreninde mi elektus vin bela kiel nun - nokte!'

'Kaj ĉu mi devas resti malbela ĉiun tagon, la moko de Kameloto?'

'Nu, jes, eble, vi pravas, bela tage!'

'Kaj ĉu vi volas la damon en via lito?'

'Ah, aĉe! Neniul ajn!'

‘Kion do vi elektos?’

Gavino pensis longe kaj forte kaj decides ke ambaŭ elektoj estus egale malbonaj, kaj ke li **ne volas** decidi.

‘Ĉu vi decidis, karulo?’

‘Jes, kara edzino, mi decidis ke estas decido por **vi** sola.’

‘Por mi? Ĉu vi certas?’

‘Jes! - kaj cetere ĝi koncernas vian belon.’

Meleflora ridis melodie kaj aplaudis. ‘Jen la plejebla bona respondo! Vi

donis al mi **mian propran volon!** Tio estas la rompiĝo de la sorĉo. Mi estos ĉiam via, kian vi vidas min nun. Kaj ankaŭ mia frato estas libera!’

Oni devas imagi por si mem la matenan surprirzegon en la ĉambrego kiam Gavino envenis kun sia radie bela edzino, precipe ĉe tiuj fraŭloj kiuj ne akceptis ŝin kiam ŝi estis la hida damo.

Kaj la novaj geedzoj restis fidelaj amantoj dum siaj longaj vivoj.

Divenu la urbon – Parto 2-a

DAVID RYAN (WELLINGTON)

Ĉu vi jam divenis kiun urbon ni vizitis? En kiu urbo/lando vi trovos irlandan trinkejon, romkatolikan eklezian (ĉu vi vidis la francan flagon?), kaj statuon de franca heroino.

Do, la respondo estas Nov-Orleans!

En januaro ni pasigis kvar tagojn en Nov-Orleans. La urbo estas ege interesa urbo pro ĝia multlingva historio kaj bela arkitekturo.



Konstruaĵoj en la fama ‘franca kvartalo’: fakte, la nomo estas eraro ĉar okazis granda fajro en 1788 kiu detruis preskaŭ la tutan (tiam francan) urbcentron kaj la nunajn konstruaĵojn konstruis la hispanoj post la fajro laŭ hispana stilo

Francoj fondis la urbon kaj la provincon de Luiziano en 1718 por regi la grandan riveron Mississipi. En tiu tempo francoj regis grandan parton de la meza parto de la nuna Usono ĝis la landlimo kun Kanado kie la francoj ankaŭ regis la nunan Kebekion. La rivero estis ege grava ĉar akvo reprezentis la ĉefan vojon por komerci kun tiu parto de la nuna Usono. Kiu regis la delton de la rivero tiu regis komercadon en la granda nordamerika kontinento. Oni elektis tiun lokon por fondi urbon ĉar, laŭ



Stratŝildo kiu montras la hispanan historion



Ŝildo en la katedralo: mi faris ĉi tiun foton por montri la nomon de sinjoro en la hispana lingvo de antaŭ pli ol 200 jaroj kaj nun la membroj de la moderna familio de tiu sinjoro havas anglalingvajn nomojn

lokaj indiĝenoj, tiu estis la plej alta peco de tero en la riverbordo. Poste, kiam okazis la uragano Katrina en 2005, la urbcentro ne suferis damaĝon pro ĝia alta situo.

Do, ekde la fondiĝo de Nov-Orleans, tie oni parolis la francan lingvon. En 1763 Francio transdonis ĝian kolonion al Hispanio. Alvenis multaj hispanaj soldatoj kaj oni verŝajne bonvenigis ilin ĉar, kiel la francaj enloĝantoj, ili estis romkatolikaj. Hispanaj soldatoj edziĝis kun franclingvaj edzinoj sed ŝajnas ke la franca restis la ĉefa lingvo



En franca en la katedralo konstruita en 1789-1794

ĉar infanoj lernis la patrinan lingvon.

Poste, Hispanio redonis la kolonion al Francio en 1795 sed, en 1803, Napoleono vendis Luizianon al Usono. Laŭdire, la tieaj enloĝantoj ne sciis pri tio ĝis du jarojn poste kaj ili ne estis kontentaj kiam ili eksciis pri tio. Ekde tiam, Luiziano estis parto de Usono. Dum milito inter Britio kaj Usono en 1812-15, okazis grava batalo ne for de Nov-Orleans. Usono gajnis, sub la gvido de Andrew Jackson kiu poste iĝis Prezidanto de Usono. Nun estas statuo de li en la ĉefa placo de Nov-Orleans.

Nun Nov-Orleans estas vizitinda urbo pro la beleco de ĝia 'franca kvartalo' kaj malnovaj domoj, muziko, kaj lokaj manĝaĵoj. Tre malmultaj homoj parolas la francan, sed oni vidas francajn postrestaĵojn en la



La katedralo kaj statuo de Andrew Jackson



Bela malnova domo

konstruaĵoj kaj stratnomoj. Estas pli da homoj kiuj parolas la hispanan, sed eble ili estas de Meksikio.

Ĉu vi scias de kie venas la vorto 'cajun' por priskribi la kuiristilon de Luiziano? Dum la 18-a jarcento Britio konkeris la francan teritorion en la nuna orienta parto de Kanado (Kebekio kaj aliaj provincoj). Post kverelo kun la novaj britaj regantoj, en 1765 alvenis al franclingva Luiziano multaj franclingvanoj de tiama parto de franca Kanado kiu nomiĝas Acadie. Tiuj nomiĝis 'acadiens' kaj tiu vorto iom post iom iĝis 'cajuns' (la 'd' en 'acadiens' povas havi preskaŭ 'ĵ'-sonon).



Tombejoj: ne eblas enterigi kadavrojn sub la tero pro la nivelo de la akvo – en ĉi tiuj tombejoj kuŝas ofte multaj membroj de la sama familio



Poeziece Esperanto Venkas (Parto 2)

PAUL DESAILLY (SUD-AŬSTRALIO)

Anchar (The Poison Tree) - *A S Puŝkin*
Angla traduko el la rusa de Walter Morison

In the pale, unyielding desert,
On soil that the sunrays curse,
Anchar like a dreadful sentry
Stands—sole in the universe.

The sun-tortured, thirst-racked steppeland
Gave it birth in a day of wrath
And fed the dull green of its leafage
And its roots with a poisoned broth.

Through its bark thick poison oozes
And, melting when midday comes,
Congeals again in the evening
In smooth, transparent gums.

No bird ever lights in its branches,
No tiger approaches the tree:
Alone, the black storm-winds brush it
And, venom-infected, flee.

If a wandering rain-cloud moistens
Its dense and unstirring leaves,
The burning sand from its branches
A poisonous dew receives

But one man to the tree sends another
With a glance that, imperious, burns,
And the poor slave sets out on his journey
And at dawn with the poison returns.

He brings with him poisonous resin
And a branch with a few faded leaves,
And the sweat on his pallid forehead
In thick streams trickles and cleaves.

The poison he brings, and fainting
At the feet of his dread lord lies
On the bast that the tent-floor covers.
He utters no word, and dies.

But the king, in that poison steeping
His arrows with secret art,
To his enemies sends destruction
And death on each poisoned dart.

Anĉaro - *A S Puŝkin*
Esperanto-traduko de K. Kalocsay

En la dezert' sterile nuda,
El grund' bakita de sun-ardo
Anĉar' elĝermis, staras muta.
Ne kreskis en proksim' eĉ kardo.

Ĝin naskis la soifa tero
En furiozo mondmalbena,
Kaj per veneno de kolero
Saturis ĉiun fibron plena.

Venen' filtriĝas tra la krusto
En la tagmeza varmo suna,
Ĉe l' vento de vesperkrepusko
Koagulas je rezino bruna.

Proksimon ĝian bird' evitas
Kaj timas tigro, Se la sibla
Venteg' la branĉojn ekagitas,
Tuj plu ĝi flugas, venenkribra.

Kaj se la nuboj de l' ĉielo
Pluverojn sur anĉaron ŝutas,
De la folioj kaj de l' ŝelo
Venene tiuj teren gutas.

Hom' homon tamen por aliro
Komandis per rigard' rigora.
Fidele iris tiu viro,
Revenis kun la suk' horora

Portante krom rezin' fatala
Velkintan branĉon en tornistro,
Kun ŝvit' malvarma sur la pala
Vizaĝ' sin trenis la servisto.

Li falis tie tuj en sveno,
Pro elĉerpiĝ' de l' lasta forto.
Ĉe l' trono de la suvereno
La sklavon tiel trafis morto

La princo ĉiujn sagojn suki
Ordonis per venen' anĉara,
Per arkoj tiel sendis flugi
La morton al popol' najbara.

Locksley Hall - *Alfred Lord Tennyson*

For I dipt into the future, far as human eye could see,
Saw the Vision of the world, and all the wonder that would be;

Saw the heavens fill with commerce, argosies of magic sails,
Pilots of the purple twilight, dropping down with costly bales;

Heard the heavens fill with shouting, and there rain'd a ghastly dew
From the nations' airy navies grappling in the central blue;

Far along the world-wide whisper of the south-wind rushing warm,
With the standards of the peoples plunging thro' the thunder-storm;

Till the war-drum throb'd no longer, and the battle-flags were fur'd
In the Parliament of man, the Federation of the world.

There the common sense of most shall hold a fretful realm in awe,
And the kindly earth shall slumber, lapt in universal law.

Kastelo Locksley - *Alfred Lord Tennyson* Esperantigis Anneke Schouten-Buys

Ĉar mi trempiĝis en la futuron
Tiel malproksime kiel vidpovas homokul'
Vidis la vizon de la mondo
Kaj ĉiun miraklon estontan
Vidis la ĉielojn komercpleniĝantajn
Ŝipegojn magivelajn
Pilotojn de la purpura krepusk'
Ankrantaj kun pakegoj multvaloraj
Aldis la ĉielojn kri-plenigitajn
Kaj ekpluvis terura ros'
De naciaj ĉielaj mararmeoj
Luktantaj en la centra blu'
Fore la l'mondvasta flustro
De sudaj ventoj varme impetantaj
Kun la standardoj de l'popoloj
Plonĝantaj tra la uragan'
Kaj la batalflagoj ferliĝis
En la parlamento de la hom'
La federaci' de la mond'.
Tie la prudento de la plimulto
Tenos malkvietan regnon en granda respekt'
Kaj la afabla ter' vidis dormon
Ravita en universala leĝ'.

ULYSSES - *Alfred Lord Tennyson*

Come, my friends,
'Tis not too late to seek a newer world.
Push off and sitting well in order smite
The sounding furrows; for my purpose holds
To sail beyond the sunset, and the baths
Of all the Western stars, until I die.
It may be that the gulfs will wash us down:
It may be we shall touch the Happy Isles,
And see the great Achilles, whom we knew.
Tho' much is taken, much abides; and tho'
We are not now that strength which in old days
Moved earth and heaven; that which we are; we are;
One equal temper of heroic hearts,
Made weak by time and fate, but strong in will
To strive, to seek, to find, and not to yield.

Crossing the bar - *Alfred Lord Tennyson*

Sunset and evening star,
And one clear call for me!
And may there be no moaning of the bar,
When I put out to sea,
But such a tide as moving seems asleep,
Too full for sound and foam,
When that which drew from out the boundless deep
Turns again home.
Twilight and evening bell,
And after that the dark!
And may there be no sadness of farewell,
When I embark;
For tho' from out our bourne of Time and Place
The flood may bear me far,
I hope to see my Pilot face to face
When I have crost the bar.

ULISO - *Alfred Lord Tennyson*
Esperantigita de Ralph Harry

Venu amikoj,
Ne tro malfruas serĉi novan mondon.
Surakven! Kaj orde sidante frapu
la ondojn sonantajn; mia celo restas
veli preter sunsubiron kaj la banojn
de ĉiuj okcidentaj steloj ĝis mi mortos.
Eble la golfoj nin ensuĉos;
Eble atingos ni Gajajn Insulojn,
vidos faman Akilon, kiun ni konis.
Multe preniĝis tamen multo restas;
Ni malpli fortas ol en fruaj tagoj
kiam ni movis teron kaj ĉielon, sed
egale havas ni heroajn korojn,
Pro tempo, sorto feblaj, vole fortaj
strebi, serĉi, trovi kaj ne cedi.

Trans la sablo-bar' - *Alfred Lord Tennyson*
El la angla tradukis Ŭoago

Planed' eĉ sun-subir'!
Por mi senduba vok'!
Ne estu muĝo ĉe la sablo-bar'
Je mia ekvojaĝ'.

Sed kvazaŭ-dorme-mova tajda flu'
Sen bruo kaj sen ŝalm',
Por porti la veninton el profund'
Ree al hejml'

Krepuska sonoril'!
Kaj poste la mal-lum'!
Kaj manka estu adiaĵ-malĝoj'
Je mia ir'.

Ĉar kvankam tra ĉiela senlimec'
Forportos min la mar',
Rigardos la Piloton en vizaĝon
Mi – trans la sablo-bar'!

Vivo en la Spirita Mondo

BOB FELBY (ADELAJDO)

Havis viro hundon. Tiu hundo certe ne estis granda dano kia mi, sed tamen hundo. Ĝi estis hundeto blanka! Mi eĉ tre bone scias ke ne ĉiuj hundoj estas blankaj ĉar mi vidis kelkajn brunajn kaj kelkajn nigrajn. Sed nun mia tasko estas transdoni al vi, miaj gelegantoj, la veron pri io kio almenaŭ al mi estas tre grava, eĉ gravega, kaj espereble iom post iom tio sama iĝos ankaŭ al vi gravega!

Tiu viro kun la hundo estis bona. Ankaŭ la hundo estis bona, sed la plej multaj hundoj estas tiaj, ĉu ne? Sed ĉar ankaŭ la viro estis bona, ŝajnas al mi, ke decas nomi lin “bonulo”. Tion farante ni plaĉas ja ankaŭ al nia majstro Zamenhof, ĉu ne? Tiu kiu inventis ne nur la vorton “bonulo” sed la tutan lingvon kiun vi nun ĝuas legadi! Tiu eta blanka hundeto estis, de sia bona mastro, nomata Ĝivo. Tiu benata nomo signifas “vivanta animo”! Ĉu tio gravas, eble ne al vi, sed al la eta blanka hundeto tio eĉ treege gravas, ĉar tio estis ja ĝia nomo. Mi supozas ke al vi gravas ja ankaŭ via nomo, kvankam ĝi plej verŝajne ne estas Ĝivo!

Nu, Ĝivo kaj ĝia homo estis eĉ bonegaj amikoj. Fakte la viro loĝis tute sola en sia domo ĝis kiam iun belan tagon venis en lian vivon Ĝivo. Ekde tiam li ne plu estis sola kaj ankaŭ Ĝivo ne plu estis. Ni ne bezonas scii ĉu ĝi estis sola antaŭ ol ĝi renkontiĝis kun la viro kies nomo estis, ne, ĉion konsiderinte, mi subite memoras, ke ni jam decidis, ke ne gravas tio kio

estis lia nomo!

Pasis multaj jaroj kaj homaj kaj hundaj. La homaj jaroj estas, laŭ surteraj mezuroj, multe pli longaj ol hundaj. La bona viro iĝis pli kaj pli laca, sed Ĝivo iĝis eĉ pli laca ĝis kiam iun belan matenon ĝi endormiĝis por ne plu vekiĝi.

Tio ne precize plezurigis la bonulon kies hundeto Ĝivo estis. Li karesis la korpon de sia amata hundeto, portis ĝin en la ĝardenon kaj enterigis ĝin.

Li reeniris en la domon, fakte en la kuirejon, kaj preparis por si tason da teo. Nu, teo sugestas, ĉu ne, ke tiu bonulo, plej bona amiko de Ĝivo, loĝis en Aŭstralio aŭ alia lando kies ĉefa lingvo estas la angla. Se mi estus skribinta “tason da kafo”, oni povus supozi ke li loĝas en kiu ajn alia lando kie la angla lingvo ankoraŭ ne estas la ĉefa!

Tiam ekpasis ankoraŭ kelkaj jaroj, sed ne tiom kiom pasis antaŭ ol Ĝivo forpasis. La bonulo iĝis ne nur tre, sed multe pli laca, kaj iun belan tagon li simple ne vekiĝis en la lito, sed anstataŭe vekiĝis en iu bela regno de la Spirita Mondo.

Apud la lito, sur kiu li kuŝis, staris belega spirito, juna kaj belega, kaj tute ne laca. “Bonan matenon” diris tiu. Ĉu vi ĝuis vian tempon sur la Tero?” “Jes, ĉu mi ne plu estas sur la Tero?” demandis la bonulo. “Ne plu”, respondis la belega spirito, “vi nun estas en la Spirita Mondo kune kun mi”. “Jes, mi vidas vin, sed kiu vi estas?” demandis la bonulo. “Ĉu

vi ne rekonas min?" demandis la spirito. "Mi estas via plej bona amiko, mia nomo estas Ĝivo, vi mem donis tiun belan nomon al mi, kiam vi kaj mi la unuan fojon renkontiĝis sur la Tero". "Jes, mi memoras Ĝivon, sed li estis eta blanka hundo", respondis la bonulo.

"Vi nun ripozu iom pli longe. Poste mi preparos por vi tason da kafo, ĉar ĉi tie en la Spirita Mondo kafo estas preferata pli ol teo. Vi ne plu loĝas en Aŭstralio, sed baldaŭ vi mem eltrovos tion. Aŭstralio certe ne estas la plej grava loko en la universo!"

"En la Spirita Mondo oni ne laboras por gajni monon. Mono estas elpensajo de homoj. En la Spirita Mondo ĉiu helpas kaj subtenas unu la alian;

mono estas superfluaĵo. En la Spirita Mondo neniu surhavas uniformojn. Por kio surmeti uniformojn? Ĉu por ŝajnigi sin pli grava ol iu ajn? En la Spirita Mondo neniu mortigas iun aŭ ion ajn. Kaj tie neniu kuiras siajn dorlotbestojn nek manĝas ilin. Kiu ne preferus vivi tie ol sur la Tero?"

"Sed mi tamen sopiras al mia surtera vivo", plendvoĉe elbuŝigis la bonulo.

"Ne maltrankviliĝu pri io ajn" diris Ĝivo. "Vi nun reendormiĝu dum mi laboretos en la spirita kuirejo". Baldaŭ poste la kafo estis preta kaj Ĝivo trinkis ĝin, ĉar li sentis ke la bonulo meritas iom pli da dormado. Sed post tri taso da kafo Ĝivo tamen kompatis la bonulon kaj vekis lin. "Jen via promesita bongusta taso da

Saljuton! Bonvejnon al ostrejlio!
Ĉu vi paroŭlas Esperenton? Ĝi estas
trej fasila!



Sukceso pri la n-finaĵo

kafo“, li diris. “Koregan dankegon“, respondis la bonulo, kaj trinkis ĝin. “Vi faras eĉ tre bongustan kafon ĉi tie en la Spirita Mondo, sed ial mi ege sopiras al mia bona vivo surtera“. “Jes, ĉi tie ni ŝatas plaĉi unu al la alia“, respondis Ĝivo. “Ŝajnas ke sur la Tero tro multaj homoj preferas ignori unu la alian aŭ almenaŭ malpermesi al aliaj homoj vojaĝi kien ajn sur la Tero, kvankam ili ja naskiĝis tie! Mi aŭdis ke iu frenezulo sur la Tero intencas konstruigi grandegan kaj malbelegan muron inter du landoj. Ĉu vi vere deziras ree loĝi tie, kie tia frenezulo loĝas? Ĉi tie ni faras ĉion eblan por amikiĝi kun kiu ajn! Sed ellitiĝu kaj venu kun mi. Atendas por renkontiĝi kun vi multaj el viaj bonegaj geamikoj de la Tero“.

Kaj vere, ili eliris el la domo kaj en la ĝardenon. La belegan spiritan ĝardenon. Tie staris multaj belegaj spiritoj kun larĝe ridetantaj vizaĝoj. “Bonvenon vi amuza sed tamen bonega amiko“, ili ĉiuj diris. “Dankon, eĉ dankegon“, diris la bonulo, “sed mi ŝatus reveni al la Tero, kie mi pasigis tiom da tempo kune kun miaj multaj geamikaj dorlotbestoj! Sur la Tero mi povis perlabori multe da mono, poste elspezi ĝin aĉetante bieron, cigaredojn, viandon, drogojn, kaj aliajn necesajojn. Mi povis amuzi min malĝojigante aliajn homojn. Sed ĉu

mi konas vin? Viajn aspektojn mi ne bone memoras!“

“Ha, ha, ha,“ ili respondis. “Ni ĉiuj estas viaj dorlotbestoj kun kiuj vi ĝuis vian surteran vivon. Ni estas viaj birdoj, katoj, fiŝoj, ĉevaloj, hundoj, testudoj, kunikloj, anasoj ktp.“ “Ĉu vere? Mi apenaŭ povas rekoni vin“. “Bone, eĉ bonege, kamaradoj kaj kunuloj, ni montru al li nian tiaman aspekton. Li vere meritas memori ĉiun el ni, ĉu ne?“ demandis Ĝivo.

Kaj eĉ treege rapidege, fakte fulmorapidege, ili ĉiuj ŝanĝiĝis en siajn iamajn surterajn aspektojn. La bonulo ridegis kaj ploris samtempe. Neniam antaŭe li estis tiom feliĉa. Li certe ne plu sopiris al sia surtera vivado. Ekde tiam li komencis ĝuadi sian novan vivon en la Spirita Mondo kune kun siaj multaj bonegaj geamikoj, birdoj, katoj, fiŝoj, ĉevaloj, hundoj, testudoj, kunikloj, anasoj ktp. jes, eĉ gekokoj, mi preskaŭ forgesis ilin!

“Nun, ĉar ekde nun ni ĉiuj rekonas unu la alian, ni ne plu bezonas surhavi la aspektojn de tiom multe da bestoj, aŭ ĉu? Ĉar en tiu ĉi regno de la Spirita Mondo ni ĉiuj egalas, io kio ne faktas sur la Tero. Mi proponas ke ni ĉiuj restu en tiuj ĉi niaj spiritaĵoj ĉar ni ne plu reenkariniĝos kiel bestoj!“

Kaj tiel estis. La bonulo daŭrigis sian vivon en la Spirita Mondo kune kun siaj multaj veraĵ geamikoj.

Anoncoj

70-a kongreso de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE)

1 - 8 julio 2017, Udine, Italio www.ikue.org/kong2017/

67-a kongreso de la Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI)

1 - 14 aŭgusto 2017, Zöblitz, Germanio keli.chez.com

Aŭtuno kaj vintro

DONALD BOWIE (AUCKLAND)

Kun okulfrapa paletro da koloro,
ebria estas la cerbo kun kontenteco,
Kiom da drogoj aŭ trinkaĵo oni bezonas,
kiam naturo plenigas la sensojn?
Vintro alvenas, sed ni ne ĉagrenas
Ja, la malvarmeco ruĝigas nazojn,
kaj rozkoloriĝis al ni la vangoj
Sed sunplena mateno surprizon donas,
kiam pezaj rosgutetoj lumadas
kiel ĉielarkoj pendantaj de sur arbaretaro
Etaj diamantoj recikligas la sunon,
kaj briletas laŭ la venteto
Okulfrapa plezurema donacaĵo.

Kie ploras koroj

DONALD BOWIE (AUCKLAND)

Ĉe la marbordo,
Kie la maro renkontas plaĝojn,
Kun ĉagrenoj surskribitaj,
Knabino ĵetas paperajn pecojn.

La ondetoj fortiras la vortojn
Forprenantaj ŝiajn ĉagrenojn,
La knabino reiris al sia urbo
La domaĝo de Gazo.





New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

Bradley McDonald | President

Ivan Pivac | Vice-President

Chris Krageloh | Secretary

Dave Dewar | Assistant Secretary

David Ryan | Treasurer

Committee Members:

Erin McGifford

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.



Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | President

Jonathan Cooper | Vice-President

Heather Heldzingen | Treasurer

Esther Parris | Secretary

Committee Members:

Joanne Johns, Indrani Beharry-Lall

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.

WHAT IS THIS?

Perhaps you've picked up this magazine by chance and you're wondering, what is this language? It looks like Spanish, doesn't it? But it's not, and it's not Klingon either. This magazine is written in Esperanto. Have you ever heard of Esperanto? Where is it spoken?

Esperanto is a planned language. It's not the official language of any country, but it's spoken in over 100 countries across the world. It's designed to be a second language that everyone can speak. So, if you come across someone from Mexico or Taiwan, you don't have to speak Spanish or Chinese, and they don't have to speak English to you. If everyone spoke Esperanto, we could talk together in Esperanto as equals and we wouldn't have to learn so many languages.

Esperanto is an easy language. Its grammar is regular. It can be learned in much less time than other languages. Have a look inside this magazine – you'll probably be able to make out a few words or get a general sense of some sentences. You can learn Esperanto on the net (we recommend lernu.net or duolingo.com), or from a book, or come to one of our meetings throughout Australia and New Zealand. Also go onto YouTube or Wikipedia. You'll find lots of material there in and about Esperanto.

What can you do with Esperanto once you've learnt it? Well, the world is your oyster. Get in touch with other people who speak Esperanto – chat with them online or go to a congress or cultural event. Even if you stay at home, there are hundreds of books and magazines either written in Esperanto or translated from other languages. There are music CDs, radio broadcasts, even films in Esperanto. People with similar interests who speak Esperanto also get together, such as cyclists, doctors, Rotarians, or coin collectors. There are plenty of opportunities to use Esperanto to communicate with other people throughout the world.

Esperanto will open the world to you – beyond our usual English-language confines.

Interested? See the contact details on the inside back cover.